

& Vento kaj suno:

< Per melodio #F rekante 37 el 61 batoj por strofo, entute 366 paŝoj dum 5 minutoj.
Per melodio #S rekante 32 el 53 batoj por strofo, entute 318 paŝoj dum 4 minutoj.
Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj
rekantaĵo kaj melodio inspirita de sveda polso "Forslundspolskan" (#F) kaj aldonis
poste alternativan melodion pli simplan (#S).>

(#Melodioj:

((#F: <:61> /Mi DoMi SoTi reTi dolmi mi; reremi reTi SoTi reTi dolmi mi; Mi DoMi
SoTi reTi dolmi mi3;mi remi reTi SoTi reTi dolmi mi;

(#Rekantaĵe: Mi do mire doTi LalSoLaTi do TiSo La La FaMilRe Mi Mi i ; Mi DoMi
So3So SoFa DoFa La3;La dore doTi SoTi reTi domi ; Mi do mire doTi LalSoLaTi do
TiSo La La FaMilRe Mi Mi i))

?

(#S: <:53> /So LaLa TiTi dodo TiLa; SooSoSo LaLa TiTi TiLa So So3;So LaLa TiTi
dodo TiiLa;La SoSo LaLa TiTi TiLa So So;

(#Rekantaĵe: Ti doododo dodo TiLa SoLa Ti TiTi dodo TiTi do do; SooSoSo So3So
LaLa SoFa Mi3;Mi FaFa FaFa SoSo LaTi do do3;Ti doododo dodo TiLa SoLa Ti
TiTi dodo TiTi do do))

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /La vento kaj la suno vetis, ; kiu el ili
estas la pli forta, ; kaj kiel provon, ili
me2tis ; depreni de migrulo
mantelporta

(×; **Nun kantu fiere per via plej forta
voĉo kun sincero ; Unu per varm',
alia per malĉarm' ; Varias la vetero
sur la tero ; Nun kantu fiere per via
plej forta voĉo kun sincero.)**

'2 la vestojn. Nu, la vento provis ; l'
unua: Ĝi kolektis sian spiron, ;
ekstreĉis sian pulmon, blovis, ;
blovegis laŭ la tuta pov' la viron,

'3 sed ju pli furioze ĝi diboĉis, ; la
vestojn tiu des pli firme kroĉis, ; eĉ
plejdon ligis ŝultre. ; La vento nun
rezignis, senrezulte.

'4 La suno sekvis. Ĝi trankvile ;
eklumis, disverŝante varman helon, ;
jam lumis tiel varmobrile, ; ke la
migrulo plejdon kaj mantelon

'5 demetis. Tiam ĝi ekardis. ; La homo
disbutonis sian jakon, ; sed ankaŭ nun
tro varme fartis, ; abunde ŝvitis, sentis
veran bakon,

'6 plu ne eltenis; jakon, pantalonon ;
deĵetis, eĉ ĉemizon kaj kalsonon, ; kaj
plonĝis, tute nuda, ; por bani sin, al la
river' apuda.)